



## Aperis nova PIV

Nova Plena Ilustrita Vortaro jam estas akirebla de la libroservo de UEA. La nova eldono, kiun ĉefredaktis Michel Duc-Goninaz, estas funde reviziita kaj aktualigita, kun ilustraĵoj lokigitaj ne plu en la lastaj paĝoj, sed enkorpiigitaj en la teksto mem. Formato: 150x255 mm, 1265 paĝoj. Eldonis SAT. La Libroservo de UEA vendas ĝin kontraŭ EUR 78,00 plus la kutimaj aldoniĝoj - Membroj, kiuj deziras komune mendi kun jam anonciĝintaj 8 Hamburganoj, enlistigu sin ĉe Jürgen Wulff, por ĝui rabaton de grupa mendo.

### Editoraĵoj

Eldonanto: *Hamburga Esperanto-Societo r. a.*

Klaus-Groth-Str. 95, D-20535 Hamburg  
Tel/Faks: +49 40 250 30 65

Prezidantino:

[Dr. Vesna Stanicic-Burchards](#)

Redaktoro: [Benno Klehr](#)

Retpoŝto: [Hamburg@Esperanto.de](mailto:Hamburg@Esperanto.de)

Redaktofino de

n-ro 6/02: 15-09-2002

### Nova adreso

Ek de la 15a de Aŭgusto 2002 bonvolu uzi mian novan adreson, kiun mi jam indikis en la maldekstra kadro de la papera versio de Esperanto Hamburg.

Benno Klehr

### Hamburgaj Temoj

Ek de Junio ĉiumonate okazu prelegeto de iu klubano pri temo kiu taŭgas por prezenti nian urbon al gastoj. Tiel, ĝis la venonta jaro, ni ĉiuj lernos multon pri nia urbo por ke ni povu kiel ĉiĉeronoj prezenti nian urbon al gastoj, kiuj venontjare survoje al UK vizitos Hamburgon.

La HES klubejo malfermita Jhaŭde ek de 19:30 h

Programo: 20:00.

Esperanto Haus donnerstags ab 19:30

Uhr geöffnet.

Programm: 20:00 Uhr.

## Sentenco

Ne estas multa tempo inter tiu,  
kiam oni estas tro juna,  
kaj tiu, kiam oni estas tro  
maljuna por fari ion

N.N.

Jaŭde ek de la 18.30 h okazos  
"Postkursa Rondo" kun ekzercado kaj  
ludoj por plibonigi sciojn kaj  
parolkapablojn.  
Gvidas Jutta Sültz

### Prelego de Anatol Gončarov

la 29-an de aŭgusto 2002:

La popolo en Rusio post perestrojka ekhavis malpli bonajn kondiĉojn vivi sane aŭ kuraci sin same kiel ĉe pasinta socialismo. La vivo plimultekostiĝis, la kuraciloj same kaj kuracado pli-parte iĝis alte pagata. Vole-nevole la popolanoj devis iri alian vojon vivi kaj sanigi sin. Ankaŭ ĉe la socialismo estis apartaj personoj, kiuj serĉis/uzis netradiciajn metodojn resti sana aŭ kuraci sin preter medicino. Nun tiuj aferoj iĝas pli amasaj. Post priskribi kelkajn sansistemojn la preleganto ekrakontas pri la persona sperto sanigi sin preter-medicine. Li ekzemplos pri diversaj metodikoj, rakontas pri laŭgrada akirado de tute fortaj sano kaj eltenemo. La aŭtoro pruvas, ke la sano de ĉiu homo estas en liaj manoj kaj dependas de liaj scioj pri la alternativaj manieroj preventi malsanojn. Sekvas riĉa ilustrado laŭ la ege populara gazeto: „Sana vivmaniero" kiel kuraci tiun aŭ alian malsanon, kiel iĝi imuna al malsanoj. Ekster la kadroj de tiu prelego la preleganto havas alian neanoncitan prelegon: „Biokampo de homo kaj ties influo al la ĉirkaŭo". Ĝi estas forte ligita al la unua prelego enhance kaj kiel sekvo. Se la prelego-tempo permesos kaj ĉe la interesiĝo, la aŭtoro tuŝos ankaŭ tiun temon.

---

### VOJAĜO EN ESPERANTO-LANDO

Tiel nomiĝas la eminenta verko de akademiano Boris Kolker, ĵus eldonita de UEA. La libro apartenas al malofta ĝenro de perfektigaj kursoj de Esperanto, kiuj pro klaraj kialoj estas multe malpli oftaj ol la startigaj lerniloj. Aparte ĝin elstarigas la fakto, ke ĝi estas samtempe gvidlibro pri la Esperanta kulturo. „La ambiciaj celoj de tiu ĉi neordinara lernolibro estas instrui korean regadon de la literatura lingvo kaj kreskigi emocian ligitcon al Esperanto", - skribis Boris Kolker, prezentante la libron. Tio estas la dua eldono de la libro, radikale relaborita kaj internaciigita. La instruado okazas per la uzo de verkoj de Ludoviko Zamenhof, Claude Piron, Istvan Nemere, Julio Baghy, John Wells, Marjorie Boulton, Albert Goodheir, Emilja Lapenna, Cezaro Rossetti, Lorjak, Kalomano Kalocsay kaj dudeko da aliaj aŭtoroj. Perfektiga kurso de Esperanto kaj Gvidlibro pri la Esperanta kulturo.  
Eld. UEA , 291 p. Prezo: € 18,00. Triona rabato ekde 3 ekzempleroj.

---

La Finow-Kanal-Kunveno, 22/23.06.2002

## MS „Freiherr von Münchhausen II“



Ĉe la bordo de la lago *Üdersee*, proksime de *Eberswalde* troviĝas naturamika domo meze de belega arbaro. Modernigitaj ĉambroj kaj bonegaj manĝaĵoj regalis la partoprenantojn de la *Finow-Kanal-Kunveno*.

Jam vendredon, la alventagon, ni ĝuis la belan vesperan veteron sur teraso kaj babilante interkonatiĝis. Sabaton antaŭtagmeze okazis renkontiĝo dum kiu *D-ro Karl-Hermann Simon* prezentis sian „Lexicon Silvestre“, kiun li en diversaj lingvoj preparas jam de jaroj. Kiel li detaligis en sia parolado la vortaro rilatas al arbaraj kreskaĵoj kaj vivomedioj kaj estas grupigita laŭ nocioj kaj ne laŭunuopaj nomoj. Oni jam aperigas tiun vortaron iom post iom en volumoj kaj laŭvice en diversaj lingvoj.

Post la tagmanĝo ni veturis al *Eberswalde* kaj de tie faris **haŭladan ŝipveturadon** (Treidelfahrt) sur la *Finow-Kanalo*. La ŝipo estis tirita de blanka ĉevalo „Blitz“. La suno brilis, estis varmege. Surŝipe ni trinkis kafon kaj manĝis kukon. Vespere en nia loĝejo atendis nin kradrostado kaj poste *Hannelore Brunow* faris prezentadon de **ventrodancado** surhavante belegan Hindan veston.

Dimanĉon matene ĉiuj veturis denove al *Eberswalde* por viziti la **ĝardenkulturan ekspozicion**. Kondukis bone informita gvidantino, kiu ne nur parolis pri la eksponaĵoj, sed ankaŭ pri historiaj eventoj.

Post la tagmanĝo en nia loĝdomo ni adiaŭis kaj bedaŭris, ke tiu bela kaj interesa semajnfino pasis tiel rapide.

La sekvonta *Finow-Kanal-Kunveno* okazos 21/22.06.2003.

Pro la limigita nombro de litoj ni rekomendas al ĉiu interesulo sen prokraste mendi loĝejon ĉe la naturamika domo.

*Delia Pick*

---

### Nia programo

Aŭgusto 2002	Septembro 2002
--------------	----------------

<p><b>1 Ne tute certe:</b> kaj estas anoncita <b>Gasto el Slovakio</b></p> <p><b>8 Jürgen Wulff:</b> <b>Aŭda kvizo</b> <b>kiel tempovojaĝo</b> <b>tra televidaj serioj</b></p> <p><b>15 El Madagaskaro</b> vizitas nin <i>Misa Razanamihantra</i></p> <p><b>22 sen speciala programo</b></p> <p><b>29 Gasto el Ruslando:</b> <i>Anatol Gončarov</i></p>	<p><b>5 Hella Lanka:</b> <b>Raporto pri <i>Du und Deine Welt</i></b></p> <p><b>7 Schnupperkurs</b> <b>Sabato, 14 h</b> Proveciono kaj ĝeneralaj informoj pri Esperanto</p> <p><b>12 Klubaj Aferoj;</b> <b>Kontakto kun ĝemelaj urboj</b></p> <p><b>19 sen speciala programo</b></p> <p><b>26 Gerald kaj Mariko:</b> <b>Ötzi, viro el la glacio</b></p>
---	--

**Estrarkunsido: 26.9. - 18.00 h**



La Esperanto-Arbo en la parko „am Goojenboom" kun (dekstre) la malgranda memorŝtono en bona ordo, vizitata ĉi.somere de kelkaj klubmembroj.

Foto: Merla

### **Nia kontribuajo por la „Tago de la fremdaj lingvoj"**

En marto de la nuna jaro dum konferenco miaj gekolegoj longe diskutis pri propono por fari „Tagon de la fremdaj lingvoj" en nia lernejo ankoraŭ antaŭ la someraj ferioj. Ĉu vere estas bona ideo? multaj skeptikis. Ni jam havas ja sufiĉe da laboro! persistis la aliaj. Nur kelkaj atentigis nin pri la aktivaj gepatroj, nome la patrinoj kiuj nepre postulis ke ankaŭ nia Gimnasio Wentorf faru tion. Fine, eĉ la lernejestro subtenis la proponon kaj la konferenco demokratie decidis la aferon. Tre malgranda plimulto gajnis sed eĉ 51 procentoj sufiĉas ja en demokratio, sekve la „Tago de la fremdaj lingvoj" devis okazi en la 2-a de Julio 2002!

Kompreneble ke vole ne vole mi kaptis la okazon membriĝi en la komisiono por prepari la projekton. Kial? Nu, tiamaniere, kvazaŭ desube mi povis labori por la Fina Venko...Ĉesu ridi! Vi devas scii, ke mi sentas min kiel preskaŭ sola esperantista instruisto en mia vasta lernejlando Ŝlesvig-Holstinio. Feliĉe ke en nia klubo Lars Sözüer tuj montris sian pretecon helpi min.

Do, lasu min iomete rakonti pri la realigo de nia kontribuaĵo:

Unue, subtenata de mia kara edzino, mi konstruis grandan karton-paperan verdan testudon por nia Esperanto-informstando. Vi devas scii ke „Tesi la testudo" estas la titolo de nia lernolibro. En la koridoro la gelernantoj de mia Esperanto-grupo fiksas diversajn paperetojn por informi pri Esperanto. Krome ili amasigas inform-materialojn de nia klubo sur la tablo.

La dua aranĝo estis muzik-instruado en granda sesa klaso. Mia muzik-kolego S-ro Bergmann gvidis nin per piano kaj Lars laŭte prononcis la kantotekstojn. Ni kune kantis „Super la nuboj" kaj „Dek boteloj sur la mur". Grandan dankon al Elena Blasius pro la notoj por la lasta kanto! Estis la unua fojo ke mi ĉeestis en tia granda esperantlingva ĥoro.

La tria aktiveco okazis en alia sesa klaso. Lars kaj mi kune realigis provlecionon por Esperanto. La gelernantoj laŭte legis kaj tradukis facilajn frazojn kaj devis kunmeti novajn frazojn. Speciale en tiu aranĝo mi rimarkis ke estis bona ideo fari la instruadon kun helpanta ekster-lerneja kompetenta esperantisto. Je la fino de nia lernejar-jaro la koncentrado de la gejunuloj kompreneble ne plu estis en tre bona stato!

La kvara aranĝo estis malgranda prelego de Lars pri Esperanto. Precipe gelernantoj el dekaj klasoj interesiĝis kaj aŭskultis. Lars klarigis ke Esperanto ne estas nur facil-lernebla lingvo por internacia komunikado. Li substrekis ke pere de Esperanto oni povas vere ĝui la internaciajn kontaktojn kadre de multnombraj kunvenoj, en privataj korespondaĵoj kaj dum vojaĝoj en fremdaj landoj per Pasporta Servo.

Post nia laboro bedaŭrinde ni ne trovis tempon por viziti la aliajn diversajn aranĝojn de la „Tago de la fremdaj lingvoj", ekzemple pri angla, franca, latina, hispana, greka, hebrea, rusa kaj eĉ hinda lingvo, sed la aktivaj patrinoj de nia gelernantoj rekompencis nin per kelkaj tre bongustaj manĝaĵoj kompreneble el fremdaj landoj...

Klaüs Friese, 2-a de Julio 2002

---

### **Varbado en ĉefa stacio**

Hamburg (Isö).

En la ĉefa stacio de Hamburg, bone videbla en la granda halo jam dum kelkaj jaroj troviĝas grandega ekrano kun informoj kaj varbaĵoj.

Antaŭ kelkaj jaroj Wolfgang Beier de la oficejo Europaverständigung sukcesis la unuan fojon, tie prezenti Esperanton. Nun Gerhard Hein de nove sukcesis tie enmeti varbadon por la Internacia Lingvo.

---

## Surstrata informstando

Hamburg (ehh).

En **Eppendorfer Landstraße** dum multaj jaroj somere okazas surstrata festo de la kvartalo, kun mano, vendo- kaj informstandoj.

En Julio ĉi-jare jam la duan fojon ankaŭ Esperanto estis prezentita pere de belaspekta informstando, kiun organizis *Delia Pick* kun la helpo de kelkaj amikoj. Gratulon pro la sukceso!

---

### Sprachdiskriminierung bei der EU Lingva diskriminacio en EU (El Germanlingva retpaĝo de [Esperantoland](#))

Der Esperanto-Weltbund hat bei dem Europäischen Bürgerbeauftragten Jacob Söderman Beschwerde wegen der offenen Bevorzugung von Muttersprachlern des Englischen bei der Arbeitsplatz-Vergabe in Brüssel eingelegt. Renato Corsetti, der Vorsitzende des Esperanto-Weltbundes, verfügt über eine Liste von 400 Stellenanzeigen von Organisationen und Firmen aus dem Bereich der Europäischen Union, in denen Englisch ausdrücklich als Muttersprache gefordert wird - die Sprecher anderer Sprachen werden dadurch benachteiligt. Die betreffenden Organisationen werden durch die Europäische Union teilweise oder vollständig finanziert; in einem Fall hat auch ein offizieller Dienst der Europäischen Kommission durch eine Stellenanzeige die Gleichberechtigung unabhängig von der Muttersprache verletzt.

Der **Esperanto-Weltbund** fordert nun, dass die Europäische Kommission

1. den Diskriminierungs-Charakter verschiedener Anzeigen anerkennt, bei denen die angebotenen Stellen offiziell allen Bürgern der EU offenstehen, aber inoffiziell für Englisch-Muttersprachler vorbehalten sind („English mother tongue“, „English native speaker“, „English mother tongue or equivalent“ usw.),
2. dafür Sorge trägt, dass diejenigen Organisationen und Firmen, die Diskriminierung gegenüber den nicht-muttersprachlichen Sprechern des Englischen ausüben, nicht weiter von der EU finanziert werden,
3. Mittel und Wege untersucht, um sprachliche Diskriminierung durch diejenigen Organisationen zu verhindern, die ganz oder teilweise von der EU finanziert werden.

► UEA postulas de EU ne plu toleri dungoofertojn, postulantaj Anglan lingvon denaske kaj la praktikatan favorigon de kandidatoj por postenoj en Eŭropaj institucioj aŭ firmoj, financataj de EU.

[Re al Esperanto en Hamburg](#)